

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• *dumonata kristana revuo en esperanto* • n-ro 6 (879) • 2009 •



Lumo en Malhelo

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021;

✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,

CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio

☎ +420 325 615 651; ✉ cea.polnický@quick.cz

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,

DE 74074 Heilbronn, Germanio

☎ +49 7131 162688;

✉ siegfriedkrueger@arcor.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,-
• Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante
rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- •
Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al
la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-
poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi
al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda
poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132.
Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI -
BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;

☎ +46 (70) 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

ENHAVO

La espero - prediko en Vroclavo	123
Fedorovskaj ikono kaj Ipatjeva monaĥejo - sorto de rusaj caroj	127
Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, II	128
Tri semajnojn post la apopleksio	132
Pensoj pri pardono kaj repaciĝo	134
Bildoj pri Beregdaróc, nia kongresejo 2010	138
Protokolo de la jarkunveno de KELI	140
Informetoj	143
Demandoj	144

REDAKTORAJ VORTOJ

LA TEMPO RAPIDE pasas. Denove
ni atendas la kristnaskan feston
kaj niaj urboj kaj vilaĝoj estas
ornamitaj kaj lumigitaj por doni lumon
en la malhela vintro.

Tiu ĉi numero ankaŭ signifas ke mi
jam dum kvin jaroj funkciis kiel redak-
toro. Per multaj spertoj mi pliriĉiĝis
preparante variajn tekstojn kaj artikolojn
sed ankaŭ teknike provante eklerni
la metion de enpaĝigo. Kelkfoje la
teknika rezulto ne tute fierigis min. Do
mi devas daŭrigi mian lernadon.

Mi ankaŭ volas atentigi vin ke
baldaŭ pasis 50 jaroj post la libro “Nia
historio” kaj mi esperas ke ni povas
kolekti kiel eble plej multe el la ankoraŭ
ekzistanta memoro inter niaj membroj
kaj fari “Parto dua”-n. Ankaŭ vi povas
kontribui. Kiam vi partoprenis vian
unuan kongreson? Kiujn personojn vi
renkontis aŭ kun kiuj vi korespondis?
Skribu viajn personajn impresojn kaj ni
povas publikigi kelkajn en nia gazeto.
Vidu la ekzemplon de Åke Ahlrén en
la pasinta numero.



La espero

Prediko dum la ekumena kongreso en Vroclavo, 2009

Philippe COUSSON, FR

PREPARANTE ĈI TIUN predikon, mi serĉis tekston kiu povus rilati al la temo de la kongreso, nome la espero. Ili estas ja multaj. Kaj mi ankaŭ rigardis, kiuj estas la tekstoj proponitaj de la “oficiala” listo. Kaj jen unu bone taŭgas. Mi do elektis la hodiaŭan tekston el la Evangelio laŭ Marko.

La perikopo retenita en la romkatalika listo, kiu estas ankaŭ ĝenerale uzita



en mia reformita eklezio, estas mallonga, kvin versikloj, kiam en aliaj eklezioj ĝi povas enhavi kromajn versiklojn. En la rakonto de Marko, ĝi troviĝas post la ne-akcepto de Jesuo en Nazaret, la sendado de la disĉiploj kaj la morto de Johano Baptisto kaj tuj antaŭ la unua multobligo de panoj kaj la marŝado sur akvo.

En ĝi okazas nenio eksterordinara: neniu miraklo, neniu grava parabolo aŭ parolado. La nura citaĵo de Jesuo aspektas tre banala: “*Venu aparte kaj ripozu*”. Tamen ĝi enhavas mesaĝon gravan, rilate al Jesuo, al la disĉiploj kaj al la amaso.

Preskaŭ neniam Marko uzas en sia evangelio la vorton “apostolo”, sed li uzas ĝin ĉi tie. Eble li volis indiki la elektitojn kaj iliajn funkciojn, aŭ pli simple, li volis paroli pri la senditoj, pri tiuj kiujn Jesuo sendis, kaj kiuj ĵus revenis, ĉar tio estas la unua signifo de

Marko 6:30-34

30 Kaj la apostoloj kolektiĝis al Jesuo, kaj rakontis al li ĉion, kion ili faris kaj instruis. **31** Kaj li diris al ili: Venu mem aparte en dezertan lokon, kaj iom ripozu. Ĉar estis multaj venantaj kaj irantaj, kaj ili ne havis oportunon eĉ por manĝi. **32** Kaj ili foriris en la ŝipeto al dezerta loko aparte. **33** Kaj oni vidis ilin forirantajn, kaj multaj rekonis ilin, kaj piede oni kuris tien el ĉiuj urboj kaj antaŭvenis ilin. **34** Kaj li elvenis, kaj vidis grandan homamason, kaj li kortuŝiĝis pri ili, ĉar ili estis kiel ŝafoj ne havantaj paŝtiston; kaj li komencis instrui al ili multon.

la vorto “apostolo”: sendito.

Mi unue konsideros kelkajn elementojn en la teksto mem de tiuj versikloj, kaj poste serĉos la mesaĝon por hodiaŭ, la mesaĝon de espero por hodiaŭ.

En tiu teksto do tri roluloj: la *disĉiploj*, *Jesuo* kaj la *amaso*, en la ordo de apero.

La senditaj disĉiploj, la apostoloj, kolektiĝis ĉirkaŭ Jesuo kaj rakontis al li, kio okazis kiam ili misiis en la regiono, predikis, elpeladis demonojn kaj sanigis malsanulojn. Mirakloj okazis, per potenco de Dio.

Jesuo, kiel oni povas supozi, ĵus eksciis pri la morto de Johano, informo kiu certe atingis lin emocie.

Vi certe povas imagi, kiel ili volis resti inter si por konsolo, ripozo kaj interfortiĝo. Sed estas la lasta grupo, la amaso, tiuj kiujn impresis la paroloj kaj mirakloj, kaj de Jesuo kaj de la disĉiploj. Ili senĉese venis kaj iris. Svarmado. Jesuo do volis eliri el tiu situacio, pro siaj disĉiploj. Li do diris al ili: *Venu mem aparte en dezertan lokon, kaj iom ripozu.*

Inter ili estis pluraj fiŝistoj, ili troviĝis ĉe la lago-bordo, ili do enŝipiĝis. Sed, kiam ili elŝipiĝis, jen denove la homamaso atendis ilin. For la ripozo, for la manĝo. Kortuŝita, Jesuo instruis al ili.

Nun, pri kelkaj vortoj: *multaj* kaj *malmultaj*. Estis multaj venantaj kaj irantaj, multaj rekonis la grupon en la ŝipo, multnombra estas la homamaso kaj multon instruis Jesuo. Multa, granda estas la rikolto. Kie estas la

rikoltantoj?

Kvarfoja uzo de la vorto: multa, kaj nur unufoja uzo de la malo, malmulta: iomete ripozu. La rikoltantoj, la senditoj, povas ripozi, sed iomete, malmulte, ĉar multa estas la bezono.

Kial la disĉiploj iris, instruis, sanigis? Kial Jesuo venis ĉiteren, kial li instruis, sanigis, kaj fine mortis kaj releviĝis? Kial venis la Spirito? Kial estis atestantoj, apostoloj, kristanoj, komunumoj, la Eklezio?

Aparte en dezerta loko, dufoje uzita esprimo, en tiu kaj en renversita ordo. Kial tiu insisto? Eble por diri al la disĉiploj tiutempaj kaj postatempaj, ke, se estas bone ripozi en kvieta loko, la urĝeco estas iri al la homamaso, al la mondo. Tamen, estis eble al ili ripozi iom, ĉar Jesuo reprenis la torĉon, kaj mem instruis la homamason.

Alia paro de vortoj: *iri* kaj *veni*. La homamaso estis venanta kaj iranta, senĉese moviĝanta, serĉante ripozon, respondon, kiun ili supozis trovi ĉe ĉi tiuj homoj, Jesuo kaj liaj disĉiploj.

Same de la disĉiploj: oni retrovas la du verbojn por ili, kvankam la esperanta traduko donas la saman verbon: ili foriris, foririntaj. Ankaŭ la disĉiploj estas moviĝemaj. Ili volas fuĝi de la homamaso por ripozi kaj manĝi.

Unu sama radiko kaj malsamaj prefiksoj, kiel en esperanto, kiam la amaso

antaŭvenis al la bordo, kaj kiam Jesuo elvenas el la ŝipo.

Tiuj ĉi iroj kaj venoj finiĝas per kunveno, per renkontiĝo, per okazo por satigi iliajn spiritajn malsatojn kaj malripozojn.

Esprimo ankaŭ estas uzata dufoje, kiam la teksto priskribas la homamason: Estis venantoj kaj irantoj, kaj fine, Estis ŝafoj sen paŝtisto.

En la parabolo, oni ankaŭ diras ke la ŝafaro iras kaj venas, sed la paŝtisto estas tie kaj gardas ilin. Sed ĉi tie, ili estas ŝafaro sen ŝafisto, ili iras kaj venas sen celo, ili serĉas sencon, direkton al sia irado kaj venado. Kaj jen, kiam ili aŭskultas Jesuon, paŝtisto alparolas ilin. Tion ili atendis.

Kiel la disĉiploj, la homamaso atendis. Ankaŭ kiel la disĉiploj, ili certe malsatis jam. Sed, tio ne estis la ĝusta tempo. Ili bezonis unue alian nutraĵon, spiritan nutraĵon. La multobligo de panoj okazos poste.

Kial la homoj rekonas nin, la Eklezio, kiel tiuj kiuj estas ĉirkaŭ Jesuo, kiel tiuj kiuj kapablas instrui pri la spirita satigo, pri la vera paŝtisto?

Por Jesuo, la prioritato estas instrui ilin. La vera bezono estas tia. La homo vivas ne nur el pano, sed ankaŭ el la Vorto de Dio. Mi finos ĉi tiujn konsiderojn pri la teksto per tio.

Alia verbo estas uzata dufoje, *vidi*. La homamaso vidis la disĉiplojn, kiam

ili foriris en la ŝipo. Jesuo vidis la homamason sur la bordo. La homoj serĉis la parolon, kaj ankaŭ certe la agadon de la grupo de Jesuo. Kion ili vidis kaj aŭdis pri ili instigis ilin al la soifo pri io nova, pri iu nova atendo, pri iu nova espero. Kaj Jesuo komprenis tiun ĉi atendon, tiun ĉi soifon, tiun ĉi spiritan malsaton. Kaj li donis al ili tion, kion ili bezonis. Li instruis ilin.

Ĝis nun, mi ne multon diris pri la *espero*. Kvankam vi eble vidas kien mi volas iri. La senpaŝtista homamaso atendis ion. Ili atendis ion ĝuste de tiuj homoj. De tiuj homoj, kiujn ili rekonis. Ĉar en la antaŭaj semajnoj, monatoj, ili vidis Jesuon, aŭdis Jesuon, aŭdis pri Jesuo, ili ankaŭ eble vidis la senditajn disĉiplojn, aŭdis ilin aŭ aŭdis pri ili. Kaj Jesuo kaj la disĉiploj instruis, sanigis, helpis la homojn kaj tio kaŭzis bruon. Oni ankaŭ parolis pri ili.

Pro tiu certe parta kono pri Jesuo kaj pri lia grupo, la homoj atendis multon, esperis multon. La senpaŝtista homamaso havis spiritan malsaton, soifon, bezonon, kaj ankaŭ materiajn bezonojn, kaj ilian esperon ili metis sur Jesuon kaj la disĉiplojn.

Ĉu vi aŭdacus diri, ke ĉirkaŭ ni la homoj ne estas same senpaŝtistaj, ke ili ne havas spiritan malsaton, bezonon? Ni devas havi la rigardon de Jesuo, kiu vidis ĉi tiun spiritan mankon.

La dua demando estas: Kial la homoj rekonas nin, la Eklezion, kiel tiuj kiuj estas ĉirkaŭ Jesuo, kiel tiuj kiuj kapablas instrui pri la spirita satigo, pri la vera paŝtisto? Ĉu vi pensas, ke ĉirkaŭ ni la homoj scias, rekonas nian fidon,

kaj vidas ĝian efikon en nia vivo persona, kaj ankaŭ en nia agado ĉirkaŭ ni?

Se la respondo al ambaŭ demandoj estas “ne”, tiam la homoj atendas nenion de ni, kaj de nia fido, kaj de nia Sinjoro, kaj de nia Dio. Tiam ili ne metas sian esperon en tiun, kiu estas nia Savanto, en nian Sinjoron Jesuo Kristo. Tiam ili fuĝos kun sia mal-espero en surogatajn rifuĝejojn, ŝajnajn kaj nesufiĉajn.

Sed, ni ĉiuj estas apostoloj, senditoj. Ni ĉiuj estis vokitaj. Tio estas la signifo de la vorto Eklezio, la komunumo de la vokitoj. Ni estas elektitaj por esti atestantoj. Ni estas atestantoj de la espero. Ni estas atestantoj de Jesuo. Ne ĉiuj estas miraklofarantoj, almenaŭ ni ne rimarkis tion. Sed ni ĉiuj devas esti pretaj atesti pri la fido kiu troviĝas en ni. Ni devas esti pretaj atesti pri Jesuo Kristo, pri nia rilato al Li, pri la amo de Dio al ni, pri la amo al la homoj, kiun li metis en nin. Kaj tion oni devas agnoski ĉirkaŭ ni.

Ni ĉiuj estis vokitaj. Tio estas la signifo de la vorto Eklezio, la komunumo de la vokitoj. Ni estas elektitaj por esti atestantoj. Ni estas atestantoj de la espero.

Kio povus logi la homojn al la espero en Dio, al la espero en Jesuo Kristo, se ne la Eklezio, se ne la kristanoj? Kompreneble, la Spirito agas, kiel li volas. Tamen la ĉefa maniero, kiun li

uzas estas ĝuste la kristanoj.

Se evidente, ni vivas el tiu espero en Jesuo, sed tiu espero videblas en ni, se ĝi estas rekonebla, tiam la atendo de la homoj povos transformiĝi en deziron, kaj fine en esperon, espero ne direktita al ni, ne direktita al la kristanoj, ne direktita al tiu aŭ alia eklezio, ne direktita al la Eklezio, sed direktita al Dio kaj al Jesuo Kristo. Ĉar tiun direkton, nur tiun direkton, ni devas indiki.

Tiun instruon la homoj atendas, tiun instruon ili esperas, por ke plenumiĝu por ili la vera espero, signita per tiu ĉi kerna versiklo: *Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis sian solenaskitan filon, por ke ĉiu kiu kredas al li ne pereu sed havu eternan vivon.*

Mi tamen antaŭ ol fini, lasas al vi la jenan incitan demandon: Kial la disĉiploj iris, instruis, sanigis? Kial Jesuo venis ĉiteren, kial li instruis, sanigis, kaj fine mortis kaj releviĝis? Kial venis la Spirito? Kial estis atestantoj, apostoloj, kristanoj, komunumoj, la Eklezio?

Ĉu ne ĉar Dio esperas? Ĉu ne ĉar Jesuo esperis? Ĉu ne ĉar la disĉiploj esperis? Ĉu ne ĉar la atestantoj esperas? Ĉu ne ĉar ni esperas? Ĉu ne fine ĉar la amo de Dio estas espero al la homo?

Amen.





Feodorovskaja ikono kaj Ipatjeva monaĥejo – sortoj de rusaj caroj

KUZMENKO Larisa, RU

LA MONAĤEJO, KIU estas nomita honore al la sanktulo Ipatij (1), situas en la urbo Kostroma. La urbo estas en la centra parto de Ruslando proksime al Moskvo. La monaĥejo estas tre malnova kaj apud ĝi troviĝas du riveroj – Volgo kaj ĝia flankrivero – Kostroma. Antaŭ pli ol kvarcent jaroj en la korton de la monaĥejo iris kristanoj kaj ambasadoroj. Ili kantis himnojn kaj portis preĝejajn standardojn por renkonti junan Miĥail Romanov (2) kaj petis lin fariĝi la unua rusa caro el dinastio Romanovoj. La patrino de Miĥail, la maljunulino Marta Ivanovna estis malĝoja pro la duboj kaj eble estonta malfacila sorto de sia filo, kaj ŝi kondukis lin al la ikono de Dipatrino, nomita Feodorovskaja (3) kaj benis lin antaŭ ĝi por regado en Ruslando.

Tio okazis la 14an de marto, 1613 en la Trinitata vira monaĥejo de la urbo Kostroma. La ikono Feodorovskaja estis konata en Rusio ankoraŭ en la XII jarcento kaj de la jaro 1613 la ikono iĝis precipe honorita sanktaĵo de la cara domo de Romanovoj. La dinastio de Romanovoj regis en Ruslando ĝis 1917.

La fianĉinoj de la caraj familioj kaj de la familioj de grandaj rusaj princoj, kiuj venis el aliaj landoj akceptis Pravoslavanan kredon, starante antaŭ la ikono kaj iliaj patronoj fariĝis “Fedorovna”, tial ankaŭ la edzino de Nikolao la dua estis Aleksandra Fedorovna.

Nun Feodorovskaja ikono troviĝas en la Epifania katedralo de la urbo Kostroma. Tie en la monaĥejo pilgrimantoj povas vidi ankaŭ ok-minutan filmon pri la vizito de Nikolao la dua kaj lia familio al Kostroma la 19an de majo 1913. Tiam ĉe la pordo al la monaĥejo la familio estis renkontita de la arĥiepiskopo Tihon. En la filmo estas montrita kiel homoj triumfe krias vivante la caron. La caro aspektas ege modesta, kiel li ĉiam estis dum sia regado.

Nun la rusaj kristanoj ege petas Dion pardoni siajn pra-avojn pri la mortigo de la cara familio (4). Pro tiu teruraĵo ankaŭ la ikono suferis. La vizaĝo kaj manoj sur la ikono nigriĝis ĝuste la 18an de julio 1918, kiam en Jekaterinburgo estis mortpafigitaj la caro Nikolao la dua, carino Aleksandra Fedorovna, tri princinoj – Olga, Tatjana, Anastasija kaj carido Aleksej. ☸





Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, II

DUDICH Endre, HU

“La lumo ne devas servi la Povon”


Mani, la kuracisto el Babelo

*“La reĝo de la Ĝardenoj de la Lumo ne povas
esti samtempe perfekte bona kaj ĉiopova”*

1. De vilaĝeto al la ĉefurbo

MANI naskiĝis en la vilaĝo Mardinu (Mezopotamio), la 14-an de aprilo 216 p.Kr. (dimanĉe). Lia patro estis PATTIG (Patek) el la nobela Partha familio Haskanija, kaj lia patrino MARIAM el la gento Kamsaragan. Tiatempe en Ktesifono, la ĉefurbo de la Partha Reĝlando regis ARTABAN, la lasta partha reĝo, kaj en Romo – imperiestro KARAKALLO. Tiuj du imperioj bataladis unu kontraŭ la alia, pere de ĉiuj eblaj iloj.

Pattig aliĝis al la Tigro-borda religia komunumo de la t.n. *El-Khasaitoj* aŭ Blankvestuloj, iu Nazarena (Kristana) sekto. La spiritaj gvidantoj de la komunumo diligente studadis la sanktajn skribaĵojn, ankaŭ kelkajn apokrifajn (ne akceptitajn de la roma eklezio), ekz. la Evangelion laŭ Sankta Tomaso, la Evangelion laŭ Sankta Filipo, kaj la Apokalipson de Sankta Petro. Kontraste al la fajro-adorantaj zoroastranoj ili alte estimis la akvon:



*“Fuĝu de la fajro, sekvu la akvon;
ĉio kion ĝi tuŝas, retrovas sian
primaran purecon; ĉiu vivo naskiĝas el (la) akvo.”*

Pattig kunprenis tien sian fileton Mani, kiu estis denaske lama je unu piedo. La knabo lernis protekti sin en la tre severa reĝimo. Kiel adoleskulo, li sekrete komencis pentri (iuj konsi-

deras lin ”patro de la orienta pentro-arto”), kaj ellernis la konojn pri la kuracaj plantoj. En la aĝo de 14 jaroj li komencis aŭdi internan voĉon (de sia ”ĝemelo” ĉiela), kaj konsideris sin elektito kaj sendito de Dio, eble eĉ la *Parakleto* (Konsolanto) promesita de Jesuo.

En la jaro 240, la 24-jara Mani decidis forlasi la komunumon de la Blankvestuloj. Li faris tion ekskomunikite, forpelite, sed plene de konscio esti vokita kaj sendata de iu mistera interna voĉo.

Lia unua stacio estis Ktesifono, la ĉefurbo jam ne de Parthio, sed de Persio. Nome intertempe la sasanida Ardeŝir, la *ŝah-in-ŝah* (reĝo de reĝoj), venkis kaj mortigis ARTABANON.

2. Fontoj kaj verkoj

La tri fontoj de la strikte dualisma doktrino de Mani estis

- la filozofia neoplatonismo (speciale la gnostikismo),
- la kristanismo kaj
- la zoroastrismo.

Li mem kompilis la *Kanonon* de sanktaj skribaĵoj. Pluraj el tiuj estis dum longa tempo konsiderataj perditaj, sed en la 20-a jarcento oni malkovris kelkajn el ili en Ĉinio (Turkeŝtano) kaj en Egiptio.

La sep ”kanonaj” verkoj de Mani estas:

1. La Vivanta Evangelio,
2. La Trezoro de Vivo,
3. La Libro de Misteroj,

4. Pragmateia (greklingva eseo),
5. La Libro de Gigantoj,
6. Kolekto de leteroj (sir-lingvaj),
7. Ŝahbur-gan (persa-lingva).

Jen fragmento de teksto bone karakterizanta lian mondkoncepton.

”Komence de la universo ekzistis du mondoj, apartigitaj unu de la alia: la mondo de la Lumo kaj tiu de la Malhelo. En la ĝardenoj de Lumo troviĝis ĉiuj dezirindaj aĵoj, kaj en la Malhelo estis la deziro, fortega deziro. Kaj subite ĉe la limo inter la du mondoj okazis kolizio, la plej forta kaj plej terura de la tuta historio de la universo. Tiam la partetoj de la Lumo miksiĝis al la Malhelo, laŭ mil diversaj modoj. Tiel aperis ĉiuj kreitaĵoj, la ĉielkorpoj kaj la akvoj, la naturo kaj la homo.. Pro tio en ĉiu estaĵo ĉeestas kaj interpenetris unu la alian la Lumo kaj la Malhelo...”

3. “La kuracisto el Babelo”

Lia unua disĉiplo estis lia propra patro, Pattig. Sed Mani baldaŭ forlasis la ĉefurbon, kie li estis jam suspekta, kaj vagadis en la tuta regno.

Poste li ŝipveturis sur la Granda Maro (la Hindia oceano) al la india havenurbo Deb. Fakte li sekvis la (legendan) vojaĝon de la apostolo Tomaso (la “ĝemelo”, greklingve *Didymos*, vidu la Evangelion laŭ Joh. 21,24.)

Mani sukcese sanigis, helpe de kuracaj herboj, la filineton de princo Hormizd, la pli juna filo de reĝo Ardeŝir, estro de la ĵus triumfinta persa armeo.

Returninte sin al Ktesifono, Mani-n akceptis reĝo Ŝah-bur la I-a. Mani deklaris al la reĝo, ke *“nova epoko bezonas novan religion”*. Cetere li kuracis per parolo kaj plantoj, kaj neniam pretendis fari miraklon, sanigi helpe de supernaturaj povoj.

Reĝo Ŝahbur nomumis Mani-n *“kuracisto de la Reĝa Palaco”*, kaj ofte petis lian konsilon. En 242 la reĝo, malgraŭ la kontraŭstaro de la zoroastranaj magoj, permesis al Mani libere prediki sian religion. Tiam li estis 26 jarojn aĝa.

“La homoj donas al Dio diversajn nomojn; kaj ĉio estas vera, kaj ĉio estas falsa. Ĉar se li havus nomon, tio ne estus esprimebla per homaj vortoj.... La pastroj kaj magoj de la diversaj religioj konsentas nur pri tio, ke ili malamas kaj malbenas unu la alian.”

Mani iris al la vilaĝo Beth-Lapat, situanta ĉe la limo inter la semita lingva kaj la hindeŭroplinga regionoj. (Pli poste tiu setlejo ricevis novan nomon: Gondiŝapur, t.e. Gond-i-Ŝahbur.)

4. La Lumo ne devas servi la povon

La konfliktoj inter la du imperioj, la persa kaj la romia, iĝis pli kaj pli gravaj. Dum kelkaj jaroj la permilite humiligita Romia Imperio eĉ pagis imposton al la persa Reĝo de reĝoj. Finfine Ŝahbur venkis kaj kaptis imperiestron Valerianon.

Sed Mani obstine rifuzis subteni la militadon per sia predikado. Li eĉ tion ne akceptis, ke lia doktrino iĝu oficiala,

ŝtata religio. (En la urboŝtato Palmira, reĝino Zenobia akceptis tiun doktrinon, kaj praktikis ĝin, ĝis kiam la Romianoj venkis ŝin.)

5. La martiriĝo

Ŝahbur testamentis skribe, ke lia pli juna filo Hormuzd sekvu lin sur la trono. Ŝahbur mortis en la jaro 274. Sed ankaŭ Hormuzd mortis, venenigite, tuj post la kroniga ceremonio.

La nova reĝo estis Vahram, la pli aĝa filo de Ŝahbur, kiu timis kaj malamamis Mani-on.. Komence li *“nur”* eksiligis lin, poste kaptis kaj kondamnis lin je morto pro apostazio (forlaso de la vera Religio) kaj herezo (konfeso de tezoj kontraŭaj al la zoroastraj “dogmoj” ĵaluze gardataj de la magoj.)

Mani estis ferkatenigita kaj lasita tiel ĝis kiam – la dudek okan tagon de la torturo – mortis, la 2-an de marto 274. Lia nuda kadavro estis ekspoziciita dum tri tagoj, por ke ĉiu povu konvinkiĝi, ke li fakte mortis.

Li vivis 58 jarojn.

6. La postvivo

Malgraŭ la persekuto fare de la zoroastranaj magoj unuflanke kaj de la kristanaj episkopoj aliflanke, la sinkretisma, tolerema doktrino de Mani rapide disvastiĝis okcidenten ĝis Hispanio, kaj orienten ĝis Ĉinio.

- Multaj ŝamanoj de la nomadaj triboj de Norda Eŭrazio adoptis ĝin. Oni-dire eĉ Attila, la grand'reĝo de la

Huna Imperio estis ĝia adepto.

- En la jaro 694 p.Kr. la maniĥeismo penetris en Ĉinion, kaj en 732 imperiestra dekreto permesis libere praktiki ĝin.
- En 759 Būgū (Moujū) Khan, la estro de la Ujgura Imperio, igis ĝin oficiala, ŝtata religio.
- En 843 en Ĉinio la maniĥeismo iĝis malpermesita, poste ankaŭ persekutata.

En Eŭropo, ambaŭ instituciaj formoj de la kristanismo, nome la Katolika Eklezio (Romo) kaj la Ortodoksa Eklezio (Bizanco) konsideris la maniĥeisman persekutenda herezo. Speciale forte batalis kontraŭ ĝi Sankta Aŭgustino (Aurelianus Aŭgustinus), kiu en sia junaĝo dum iom da tempo mem

apartenis al maniĥea komunumo. (Li rakontis pri tio en siaj *Konfesoj*.) – La ofte tre kruela lukto kontraŭ ĝi daŭris plurajn jarcentojn.

Kontraŭ

- la *paŭlicianoj* en Armenio, en la 8-a jarcento,
- la *katharoj* en Provence, suda Francio, en la 11–12-aj jarcentoj,
- la *bogumiloj* en la 13–14-aj jarcentoj, sur la Balkana duoninsulo.

Tiu lukto tute ne estis nur teologia – ideologia. Nome tiuj “*herezuloj*” forĵetis ĉian eklezian hierarĥion, malakceptis la aŭtoritaton de la pastraro kaj de la feŭdaj sinjoroj. Pro tio la Eklezio kaj la Ŝtato kune persekutis ilin.

∞

Belan kristnaskan feston & Novan Jaron

al ĉiu leganto de Dia Regno
deziras la sekretario & distribuanto
kaj la redaktoro

Pavel Polnický
Bengt Olof Åradsson



Kara redaktoro, antaŭ ne longe mi vizitis Albrecht Kronenberger, kiu post sia apopleksio, okazinta je la unua de oktobro, nun ĝis meze de novembro loĝas en rehabilita kliniko en Bergzabern, Palatinato. Unu monaton post lia apopleksio mi havis la impreson ke lia resaniĝo progresas.

Li skribis leteron per sia sana maldekstra mano, kaj li petis min, transsendi la leteron al vi donante la permeson, ĝin publikigi en Dia Regno, se vi trovos tion konvena.

Tion kion li skribis, vi trovas sur la apude.

Salutas

Bernhard Eichkorn
Romäusring 20; D 78050 Villingen
www.bernhard-eichkorn.de/

Tri semajnojn post la apopleksio

Albrecht KRONENBERGER, DE

[Oktobro 2009]

Nenio doloras.
Sed tio ne signifas, ke ĉio estas en ordo.
Kontraŭe.

Mia dekstra brako ne plu obeas min.
Ĝi nur de tempo al tempo moviĝas de si mem:
ne kontroleble,
reflekse,
kelkfoje spasme.
Mia dekstra genuo emas memstarigi sin,
kaj mia dekstra piedo turnas sin eksteren.



La dekstra parto de mia vizaĝo feblas.
Manĝi estas problemo, maĉi estas laboro,
eĉ gluti akvon estas risko.
La montro-fingro de la maldekstra devas helpi la langon,
purigi la spacojn inter la dentoj kaj la vangoj.
Paroli kaj kanti, antaŭe refreŝiĝo, fariĝis peno.
Trafi la ĝustan tonon estas preskaŭ hazardo.



Mia cerbo,
difektita maldekstre je peco granda kiel ungo poleksa
devas sin nove ordigi.
Mi sentas min kvazaŭ koko kovanta ovojn
aŭ kvazaŭ hundo kuŝanta dormetante antaŭ sia kabano
atendanta sian sinjoron, kiu revenos vespere post la taga laboro.
Inter la manĝo-horoj kaj la kurac-horoj regas nura intertempo.



Mi apenaŭ povas koncentriĝi.
Mankas preskaŭ ĉiuj interesoj.
Pli urĝe estas lerni purigi la nazon per la maldekstra mano
ol vidi novaĵojn en la televidilo;
pli grave trovi bonan sidpozicion en la rulseĝo
ol pensi grandajn ideojn.
Eĉ preĝado ofte nur konsistas el malmultaj ne koheraj vortoj.



Sed tamen ...,
tamen ...



Ion bonan havas la afero:
Mi neniam plu en mia tuta vivo bezonos serĉi parkumejon.

[Novembro 2009]



Ok semajnojn post la apopleksio
Estas mirinde,
per kiom da bonaj homoj
ĉirkaŭis min la bona Dio.
Dankon al ili ĉiuj!
Dankon al Li!





Pensoj pri pardono kaj repaciĝo

Jacques TUINDER, NL

EN LA ESPERANTO-GAZETARO Rob Moerbeek prave rememorigis nin pri tio, ke Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2009 kiel Internacian Jaron de Repaciĝo. Li aldonis ke pro tio la Mondfederistoj donas atenton al la ekscesoj, kiuj okazis dum la kolonia milito de Nederlando kontraŭ la nuna Indonezio.

La Laborgrupo pri Internacia Juro aprobis la tre bonan proponon varbi subskribojn por esprimi kunsenton kaj pardonpeton al la viktimoj kaj al la postvivantoj, interalie en la tiama vilaĝo Rawagede, la nuna Balongsari.

Permesu al mi paroli kun vi pri respektinda Ekleziulo, kiu en decembro pasinta vizitis Nederlandon. Lia nomo



Desmond Tutu.
Foto el Vikipedio

"Se iu al mi petas: 'Pardonu min', mi ne povas diri: 'Tion mi ne faras'. ĉar tiam mi ne povus preĝi: 'Pardonu al ni niajn ŝuldojn' ".

estas tre konata kaj lia reputacio senmakula. Laca li eniris la akceptejon de la Libera Universitato en Amsterdamo. Tuj kiam la sepdeksepjarulo aŭdis muzikon li komencis laŭkutime danci kaj svingi. Mi parolas pri Lia Episkopa Moŝto Desmond Tutu. Liaj okuloj, kvankam ade gajaj kaj viglaj, vidis dum longa vivo multe da malriĉo kaj mizero. Lia voĉo ankoraŭ ĉiam krietas pro plezuro, la sama voĉo kiu kuraĝe kaj decideme elmetis maljustaĵojn en la plej danĝeraj momentoj al publika malhonoro. Jes, li havas sepdek sep jarojn, sed korpolingve dancas liaj kruroj, la samaj kruroj kiuj staris ĉe la tombejo de Steve Biko. Kiu diras Tutu, tiu samtempe diras: espero, repaciĝo kaj gajeco. La Episkopo klopodis vivi kun rido kaj sen zorgoj, ofte dirante: "Ĉio finiĝos bona, ĉar ni batalas je la flanko de la anĝeloj".

Kion ni povas lerni de li? Kiel homoj malfortaj kaj ne ĉiam konsekvencaj

certe multon rilate al kulpo, honto, pardono kaj repaciĝo. Vortoj kiuj oftas en la vortaro de la eklezia gvidanto. Mankas aliaj, malaj vortoj kiel venĝo kaj repago. Kaj lia opinio estas klara: ”*Se iu al mi petas: ‘Pardonu min’, mi ne povas diri: ‘Tion mi ne faras’. ĉar tiam mi ne povus preĝi: ‘Pardonu al ni niajn ŝuldojn’*”.

Volonte mi proponas al la legataro kelke da inspiraj kaj pripensindaj tekstoj, ĉerpitaj el la verkoj de Desmond Tutu.

1. Harmonio, afableco kaj solidareco havas grandan valoron. Sociala harmonio por ni estas la plej alta bono. Ĉio kio subfosas ĉi tiun harmonion, kiun ni ĉiuj aspiras, nepre evitendas. Kolerio, malamo, venĝemo kaj eĉ sukceso, devenantaj el agresemo kaj konkurenco, povas serioze malutili al ĉi tiu alta bono.

2. Diru nur tion, pri kio vi poste ne bezonos penti. Estas tre facile esprimi sin negative, multe tro facile; estas plej facile kritiki aferon, plendi pri iu, malaprobi ion. Ni klopodu prefere rekoni bonecon en kunhomo kaj al tio koncentriĝi. Ni prefere laŭdu iun kaj ne esplorsereĉu liajn neperfektaĵojn. Ni prefere danku al iu kaj ne esprimu plendon. ”Dankon!” kaj ”Peton” estas bagatelaj vortoj, sed ili posedas gigantan forton. Decas al ni esti vastkoraj en nia juĝado pri aliaj, ĉar ni neniam povas ekscii pri ili ĉion kion ni devus scii.

3. Mi vidis multe da ekzemploj pri kruelaĵoj kiujn ni kapablas inter ni fari

(...). Mi estis atestanto ankaŭ de nekredebla pardonemo kaj senlima kompato (...). Jes, ĉiu el ni posedas la kapablon fari la plej kruelajn teruraĵojn (...). Sed en ĉi tiu mondo ĉiu abomenaĵo renkontiĝas kun dek du bonaj faroj, kiujn neniu rimarkas (...). Ĉar ni estas profunde konvinkitaj pri tio, ke decas al homoj aspiri bonon, ni senesperigiĝas vidante ke ili faras malbonon. Nur kiam homoj emas al malgravigo de malbono, ni havas kialon perdi nian esperon. Sed en la plej granda parto de la mondo pri tio ne temas. Ni scias ke nin antaŭdestinas io pli bona.

4. Se ni kapablus rekoni nian komunan homecon kaj komprenus, ke ni apartenas unu al la alia, ke ni havas reciprokajn nian sorton en la manoj, ke ni nur komune povas supervivi, ke ni ekskluzive kune povas esti liberaj kaj en interligiteco fariĝi homoj, tiam ekestus glora mondo en kiu ni ĉiuj povus kunvivi en harmonio kiel membroj de unu granda familio, la homa familio.

5. Ni emas malestimi malfortulojn, povrulojn, senlaborulojn kaj sakstratulojn, ĉar ni altigis sukceson kaj potencon al la nivelo de niaj dioj; antaŭ ili ni pie surgenuas kaj al ili humile oferdonas. Ni emas embarasiĝi pro kompato kaj zorgemo, ĉar ĉi tiuj kvalitoj ne havas valoron en la malmola kaj materia mondo de mono kaj negoco.

6. Pardonu donas al ni la eblecon fari novan komencon (...). Pardonu estas la graco kiun oni donacas al iu, por ke ŝi

aŭ li restariĝu por rekomenci sian vivon en inda maniero. Pardonante al iu, ni fakte diras, ke ni fidas la estontan interrilaton kaj same fidas la kapablon de tiu kiu malbone agis ŝanĝi sian konduton.

7. **Vera repaciĝo** povas okazi, kiam homoj en la ĝusta maniero renkontiĝas. Kiam viro kaj virino aŭ du amikoj faris malpacon kaj klopodas poste kovri la diferencajn opiniojn per la mantelo de l' amo aŭ simple glatigi la faldojn, tiam ili tre rapide denove pasie interdisputos, per ĉiuj disponeblaj fortoj, eble per ankoraŭ pli granda obstineco. Proverbo diras: kuracisto tro molkora, vundo ĉiam plendolora. Vera repaciĝo radikas en pardonado, kaj pardonado baziĝas sur sincera konfesado, kaj konfesado baziĝas sur pentofarado, sur ĉagreno pri tio kion oni misfaris.

8. **Ni ĉiuj scias**, ke kiam geedzoj inter si malpaciis, unu el ambaŭ devas esti preta elparoli la vortojn, kiuj en ĉiu lingvo plej malfacile estas translip-eblaj. "Mi bedaŭras". Kaj la alia devas esti preta pardoni, alie ilia amrilato ne havos estontecon. Ĉi tio validas por la rilato inter gepatroj kaj infanoj, inter gefratoj, inter najbaroj kaj amikoj. Kaj inter popoloj. Konfesi, pardoni kaj repaciĝi en la vivo de nacioj ne nur estas sublimaj, religiaj kaj spiritaĵaj aferoj, nebule kaj nereale. Ili estigas la materialon, per kiu la politiko funkcias en la ĉiutaga vivo.

9. **En tiu tempo** la mondo atendis, ke okazos en Sud-Afriko terura sango-

bano. Tio tute ne okazis! Kaj kiam stariĝis registaro demokratie elektita, preskaŭ ĉiu ankoraŭ ĉiam pensis ke la homoj, kiuj tiom longe estis senrajtaj kaj kies indeco piedpremitis, kiel frenezuloj bruegas kaj kriegas. Ke ili senmezure kaj senskrupule kaŭzos veran orgion de venĝo kaj repago, kiu pereigos ilian komunan landon patrinan. Anstataŭe naskiĝis tiu rimarkinda Komisiono por Vero kaj Repaciĝo: homoj venis por malkaŝi siajn korŝirajn vivrakontojn; viktimoj elparolis sian pretecon al pardonado; kulpuloj rakontis pri siaj teruraj abomenaĵoj, sed ankaŭ petis pardonon al la homoj, kiujn ili suferigis per tiom da maljustaĵoj.

10. **En rilatoj inter individuoj** ekzistas la risko ke oni, petante pardonon al alia, estas malakceptata. La persono kiu vundis la alian povas rifuzi pardonon. La risko estas eĉ pli granda, kiam vi mem estas la vundita partio kaj deziras pardoni. La kulpulo povas esti aroganta, nekorektebla aŭ blinda, ne vere preta senkulpigi sin aŭ peti pardonon. Li aŭ ŝi tiam ne povas akcepti la pardonon oferitan. Tia malakcepto povas endanĝerigi la tutan entreprenon. Niaj gvidantoj en Sud-Afriko estis pretaj sekvi la vojon de konfesado, pardonado kaj repacigado, malgraŭ ĉiuj danĝeroj ĉi-terene embuskantaj. Kaj ŝajnas ke iliaj spekulacioj estas sukcesaj: nia lando ne fariĝis predo de katastrofo kiun oni antaŭdiris neevitebla.

11. **Decida faktoro** en la kazo kiam rilato estas difektita aŭ ebla rilato ne-

ebligas, estas ke homoj kiuj kulpas pri maljustaĵoj konfesu la veron kaj montriĝu pretaj sin senkulpigi. Ĉi tio forte antaŭenigas la proceson de pardonado kaj repacigado. Neniam estas afero facila. Ni ĉiuj scias kiom malfacile estas por preskaŭ ĉiuj el ni cedi al la penso kaj sento ke ni mise agis. Eble nenio en la tuta mondo estas tiom malfacila; en preskaŭ ĉiu lingvo la plej malfacila eldiro estas: "mi bedaŭras!". Por ni mem ni ĉiam povas pripensi kulpomildigajn cirkonstancojn kaj trovi pravigojn por niaj agoj, kiom ajn kurbaj ili foje estu, sed ni scias, ke per tio ni restas enkarcerigitaj pro niaj kulpo kaj honto.

12. En la rakonto pri Adamo kaj Eva la Biblio rememorigas nin pri tio, kiom facile estas kulpigi la partneron. Kiam Dio malfermis la okulojn de Adamo antaŭ la fakto ke li estis manĝinta de la frukto malpermesita sur la arbo donanta

scion pri bono kaj malbono, Adamo absolute ne senpacience prezentis sin akceptante sian respondecon. Li transdonis la kulpon al Eva, kaj kiam Dio direktis sin al ŝi, Eva klopodis forŝovi la respondecon al la serpento. Tiu besto havis neniun al kiu lasi la kulpon. Sekve ne estas mirige ke la pli granda parto de la homoj estas rifuzemaj se temas pri akceptado de respondeco kaj esprimado de ekskuzoj. Ni agas tute laŭ la spirito de niaj pragepatroj, serĉante la kulpon ĉe ĉio kaj ĉiu, escepte ĉe ni mem. Diri: "Mi eraris, pardonon", similas al ĉiutaga heroaĵo. Sen ĉi tiuj simplaj vortoj pardononi estas multe pli malfacile. Vera repaciĝo estas afero tre persona. Ĝi povas okazi nur inter homoj kiuj advokate defendas la propran personon, sed samtempe tion rekonas kaj respektas rilate al aliaj.

∞

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

22. decembro

Patro de la komenco kaj de la fino, tenu ĉiujn homojn en Via mano. Helpu, subtenu, gardu kaj ŝirmu precipe tiujn homojn, al kiuj daŭre okazas maljusteco. Ili trovu ripozon kaj pacon ĉe Vi. Ni daŭre laboru por la bonfarto de la homoj.





La ĉefenirejo de la kongresejo




Grandaj, belegaj ĉambroj



El la ĝardeno malfermiĝas la ĉambroj

Beregdaróc
atendas
nin somere

Komforta, ekipita
konferenca salo





Nia kongresejo 2010

En la belega ĝardeno estas ankaŭ naĝejo ...

... kaj ankaŭ lageto kaj tenisludlokoj



La ĉarma malnova reformita preĝejo, ekstere ...

... kaj interne





Protokolo de la jarkunveno de KELI

ĵaŭdon 23.7.2009 (9:30 – 12:00 h),
dum la ekumena kongreso en Wroclaw

1. Malfermo

Ĉeestas 28 membroj kaj 3 gastoj. Prezidanto Philippe Cousson malfermas la kunvenon. Komence ni kantas n-ron 537 el Adoru *"Amo de Dio ..."*

2. Elekto de protokolanto

Estis elektita Sieglinde Stamm kun Will van Ganswijk kaj Pavel Polnický kiel kunprotokolantoj.

3. Akcepto de la tagordo

Akceptita de ĉiuj.

4. Komunikoj

Salutoj al la jarkunveno venis skribe kaj pere de ĉeestantoj el diversaj landoj. Speciala saluto venis el la Internacia Junulara Kongreso, kiu okazas samtempe en Liberec en Ĉeĥio.

5. Funebra memorigo

Ni funebre rememoras pri niaj membroj Karl Buremo, Svedio, Maciej Grajek, Polio.

6. Sekretaria jarraporto

Sekretaria jarraporto de Pavel Polnický aperis en Dia Regno n-ro 3/09. Aldono pri Svedio: Jarkunveno kaj Diservo okazis kun multaj gejunuloj. La raporto estas akceptita de ĉiuj.

7. Kasista jarraporto

Ankaŭ la kompleta kasista raporto aperis en DR 3/09 kaj Siegfried Krüger klarigas ĝin. Aldonaj raportoj de Jean Bisset, nova kasistino por Britio, de Maria László por Rumanio, S. Krüger por Germanio kaj Finnlando. S. Krüger aldonas, ke ni multajn jarojn ne altigis la kotizon, nia ekvilibro estas plusa, rentumoj kaj vendo de libroj donas monon. Ni havas grandan subtenon de frato Bernhard Eichkorn, do la aktivoj estas bonaj. La elspezoj estas plejparte por Dia Regno, por novel dono de la preĝlibreto de Jelly Koopmans, por sekretaria komputilo (50%) kaj por tertrema donaco al ĉinaj fratoj. S-ro Krüger nun rezignas pri la kasista laboro kaj vidas posteulinon en Ágnes





Kasisto Siegfried Krüger klarigas la raportojn

Ráczkevy-Eötvös. Li klarigas la elspezojn kaj la buĝetojn. Por la komunaj kongresoj kun IKUE validas regularo (de KELI ne akceptita) laŭ kiu eĉ ne la parto de la gajno iras al KELI kaso. Demando venas pri la Esperanto-misio, respondo: Ni uzis la monon por diversaj celoj, ekzemple por la eldono de la preĝlibreto de Jelly Koopmans. Karl Heinz Schaeffer raportas, ke Biblio stokas ĉe B. Eichkorn. Se tiu devos ŝanĝi loĝejon, ni devos trovi novan lokon por la libroj, intertempe povas resti tie, kie ĝis nun, poste K.H.

Schaeffer transprenos la stokon en sian loĝejon. UEA mendas Biblion kaj Adoru laŭ bezono.

8. Raporto de la kaskontrolantoj

K.H. Schaeffer legas la kontrolraporton pri sia laboro kun s-ro Hub. S-ro Hub kritikis la pagojn el la kapitalo, sed finfine post klarigoj li estis kontenta. La transpreno de la kasistaj laboroj pere de Á. Ráczkevy-Eötvös ankoraŭ ne funkcias, tamen s-ro Hub ne plu kontrolos. Propono por nova kontrolisto (kun K.H. Schaeffer) estas Norbert Südland kaj Markus Holzapfel. La transdono de kasistaj aferoj al A. Ráczkevy-Eötvös okazos 31.12.2009. Ĝis majo 2010 devas okazi la kontrolo. La propono por nova kontrolisto, pro persona necerteco de la kandidatoj (pri la libera tempo) nun estas elektitaj ambaŭ. Ĉiuj ĉeestantaj membroj akceptas nun tri personojn por la kontrolo, por havi du, se unu ne povos.

9. Buĝetoj

S. Krüger klarigas la publikigitajn buĝetojn kaj korektas la mise presitajn sumojn.



Partoprenantoj



Prezidanto Philippe Cousson dankas Irén Bagi

10. Raporto de la redaktoro

Bengt Olof Åradsson donas raporton kaj pardonpetas pri la preseraroj. Li ŝatas komentojn kaj kritikojn, kelkaj estis ~ pozitivaj! Dia Regno'n ricevas laŭvole ankaŭ IKUE-anoj.

“Nia historio” ekzistas ĝis la jaro 1961, li petas raportojn de la membroj pri ilia unua KELI-kongreso (ankaŭ mallongajn) eventuale kun la fotoj. La jaro 2011 estos Jubilea Jaro de KELI (100 jariĝo) – ni planas specialan festan kongreson kaj la daŭrigon de “Nia historio”.



Sieglinde Stamm kaj Samuel Gaillard

11. Estrarelekto

Estraranoj B.O. Åradsson kaj Zoltán Somhegyi estas denove elektitaj, Irén Bagi pensioniĝas. La prezidanto dankas al ŝi pro la multjara kunlaboro kaj transdonas al ŝi libron Heroo de Amo.

12. Kongresplanoj

Por la jaro 2010 A. Ráczevy-Eötvös. konatigas nin kun la kongresloko en Beregdaróc (nordorienta Hungario ĉe ukrainia limo). Dato: lunde 2.8 — 9.8. 2010. Estas bonaj kondiĉoj. Invituloj jam estas preparitaj. Propono por kongrestemo en la Internacia Jaro de la batalo kontraŭ socia ekskluziveco kaj malriĉeco (Egalrajtoj) estas: *“Inter ili neniu havis mankon”* Agoj 4,34. Proponita kongresloko kaj la temo estis akceptitaj de ĉiuj. Por la jaro 2011 Jacques Tuinder proponas por la jubilea kongreso kastelon en Heemskerk, Nederlando, espereble kun tre konvenaj kondiĉoj.

13. Ideoj kaj sugestoj de la membroj

Arne Lundkvist proponas eldonon de jarlibro de KELI kun membrolisto. A. Ráczevy-E. laŭtlegas la leteron de Eva Farkas, kiu bedaŭrinde ne povis veni.

14. Fermo

Prezidanto Philippe Cousson fermas la jarkunvenon kun la danko al ĉiuj ĉeestantoj kaj ni kantas el Adoru n-ron 500 *“Tiel ne sekuras io”*.

Protokolis:

Sieglinde Stamm kaj *Will van Ganswijk* (kompletigis P. Polnický).

Informo

Alvoko

ELS VAN DIJK-KUPERUS, kiuj prizorgas niajn kunvenojn kaj diservon dum la UK, ŝatus scii kiujn KELI-membrojn kiuj intencas partopreni en la UK en Kubo.

Infomu ŝin rekte aŭ pere de nia sekretario.

Pavel Polnický;
Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II,
Ĉeĥio
✆420 325 615 651;
cea.polnický@quick.cz

Els VAN DIJK
Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,
Nederlando;
+31 1724 20222;
e.a.vandijk@hetnet.nl

Centro pri Biblia Studado "G. VANNUCCI"

Por la Ordeno de Servistoj de Maria realigo de Centro pri Biblia Studado signifas novan sperton: ĝi sin proponas kiel altkvalita Studejo je dispono de ĉiuj interesatoj al pli profunda ekzamenado de la Sanktaj Skriboj.

Centro pri Bibliaj Studoj ekestis el sperto de plujara laboro en la biblia kampo fare de la bibliistoj Alberto Maggi kaj Ricardo Pérez Márquez en la regiono Romagna [Romanja], Italio.

Sekve de plujara aktivado – diversloke, kaj en Italio kaj eksterlande – per bibliaj renkontiĝoj je episkopa nivelo, ili sukcesis konsciiĝi pri la grandaj malsato kaj soifo je la Parolo de Dio, nun ĉeestantaj Eklezie kaj samtempe pri la manko de ejoj konvenaj por plenumi tiun kreskadantan bezonon de lokoj kaj personoj emaj al studado kaj diskonigado de la Sanktaj Skriboj.

Vizitu la esperantan retpaĝon:
<http://www.studibiblici.it/ESPERANTO/indicesp.html>

DEMANDOJ . . . ?

La doloro estas grandega;
dum mi meditas pri la dividiteco
kaj la fendoj sur la korpo de mia popolo,
ŝiriĝas histoj miaj.

Mi naskiĝis en malluma nokto
kaj fortostreĉe serĉis la matenon.
Ĉu ĉi vojo kondukas al mateno?
Neniel aŭdiĝas respondo.

Kiom amara estas la gusto,
la gusto de fremdeco kaj ekzileco.
Mi eskapas la rigardon de mia infano,
kiam li demandas pri nia 'hieraŭo'
kaj pri diferenco inter nia
kaj la alia flanko de la muro.

Mia patrino eskapis min,
kiam mi demandis pri la morgaŭa tago.
Neniu scias kiam leviĝos la suno.
Mi naskiĝis en malluma nokto
kaj en la lando kie staris mia lulilo
... ankoraŭ ĉiam daŭras la nokto.

Forugh Bahra Karimi rifuĝis el Afganio.
Ŝian poemon tradukis Jacques Tuinder.